J. IV. - Nro. 4. Aprilo 1921.

# LA PROGRESO

ČEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ČESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. —Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

## PRAHA.

(Ĝia situacio kaj vidindaĵoj.)

(Daŭrigo.)

Iom pli maldekstre de Vyšehrad, ni vidas en la rivero Vltava du insulojn: Žofín (elp.: Ĵofín — í elp. longe) kaj Střelecký ostrov. La unua, sur kiu troviĝas embroza parko, banejo, naĝejo kaj granda restoracio kun tre belaj salonoj, ludos en la historio de nia movado rolon tre rimarkindan: en fino de julio t. j. ĝi estos deklarita por libera Respubliko Esperantista. Tiu ĉi ŝtato, ankoraŭ pli malgranda ol Monako kaj San Marino, bedaŭrinde ne ekzistos longe, ĉar ĝiaj civitanoj jam post unusemajna restado disiĝos, forveturante en ĉiujn mondopartojn. (Tie estos la kongresa Akceptejo kaj kunvenejoj!) Tamen oni ne povas dubi, ke tiu ĉi unika regno estos de ĝiaj membroj amata multe pli ol kiu ajn ŝtato alia, kaj ke ili oferos ĉion, nur por havi la eblon ĝin viziti.

Post la Střelecký ostrov estas videbla granda kupolo de la landa Nacia Teatro, kiu prezentas sin kiel eminenta monumento de nacia oferemo: El libervolaj donacoj de ĉiuj bohemoj ĝi estis konstruita en jaroj 1868—81. Sed apenaŭ oni komencis tie ludi, pro nekonata kaŭzo ĝi forbruliĝis. Tiam la tuta nacio funebris — kaj rapide kolektis novan milionon, tiel ke jam post du jaroj la nova konstruaĵo povis montri sian belecon. — Tie estos ludata por kongresanoj la konata, ĉarma kaj ĉiam nova bohema nacia opero »Prodaná nevěsta« (»La vendita fianĉino«) de komponisto B. Smetana.

Malantaŭ post la Nacia Teatro ni rimarkas alian kupolon. Ĝi estas tiu de la Bohema Landa Muzeo. Ĝi estas konstruaĵo tre majesta, leviĝanta en la supra parto de la Placo de Venceslao. La plej luksa halo de tiu ĉi palaco estas »Pantheon« kun sia brilega vitra kupolo en diametro 11 m. Grandegaj lunetoj sur galerio estas ornamitaj per bildoj de V. Brožík: »Komenský (Comenius) klarigas siajn verkojn« kaj »Fondo de la bohema universitato«. Aliaj du bildoj estas de Fr. Ženíšek: »Přemysl pluganta« kaj »Sta. Methodius«. Tie ĉi staras ankaŭ bronzaj statuoj de de personoj gravaj en la bohema historio: Libuša, Přemysl, Sta. Venceslao, Georgo de Poděbrady, Ernesto el Pardubice ktp. Ili estas fanditaj el la kanonoj, kiujn post la batalo apud Navarino (1827) estis elprenitaj el la maro. En la muzeo troviĝas malnova landa arĥivo kaj diversaj kolektoj: arĥeologia, mineralogia, etnografia, zologia, numismatika kaj paleontologia. La muzeo estas ankaŭ sidejo de la Bohema Akademio de Sciencoj.

La ponto, kiu maldekstre de la ambaŭ insuloj kunligas la bordojn de Vltava, estas la jam menciita »Most Karlův«.

Post tiu ĉi ponto ni vidas en amaso da domoj du paralelajn turojn, kiuj apartenas al la plej majesta preĝejo de Praha, nomata »Týn«. Ĝi estis konstruata en j. 1340—50, sur la loko, kie antaŭe staris alia preĝejeto en stilo romana. Dum la regado de la husana reĝo George de Poděbrady servis tiu ĉi preĝejo al la eklezio husana kaj Jan Rokycana, kiu poste fariĝis ĉefepiskopo, estis tie ĉi poroĥestro. Sur la frontono de la preĝejo brilis tiam ora kaliko husana, el kiu post la batalo sur la Blanka Monto oni faris gloriolon por la statuo de dia patrino. En la preĝejo estas la tomba monumento de la fama dana astronomo de reĝo Rudolfo II., Tycho de Brahe (1601). (Fino.)

oooo

# ESPERANTISMO

## XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**31. VII. — 6. VIII. 1921 en Praha.**

**VIII. Komuniko.**

**Komitato.** Eksiĝis so. Bouŝka.

**Fakan kunvenon** por virinoj aranĝos f-ino. instruistino Nesměráková, por ĉastemuloj — so. Roskes, Hago.

**Kotizo.** Vidu la VII. komunikon! Aliĝu antaŭ 1. VI. 1921 kaj pagu kotizon per siaj ŝtataj banknotoj sendotaj en rekomendita letero al la ĝenerala sekretario! La aliĝintoj bonvolu baldaŭ sendi kotizaĵon! — Krom la jam menciitaj en la VII. komuniko paĝis la sekvantaj numeroj: 10, 12, 14—20, 40, 44, 54, 61, 65, 114, 126, 128, 131, 136, 137, 146, 147, 152, 171, 172, 177, 180—183, 199, 200, 205, 213, 214—233, 254, 256, 261—263, 265—284, 287—291, 293—301, 303—309, 312—327, 333—336, 341, 344, 345, 347, 348, 364, 365, 381—390, 391—394, 395—405.

**Aliĝoj.** 180. so. Paffenholz, 181. so. Paffenholz (pli aĝa), 182. so. Heinz G. el Düsseldorf, 183. so. Hájek — Nusle, 184. so. Wiesenfeld — Warszava, 185. so. Kostelecký — Párník, 186. fino E. Macháčková, 187. fino R. Macháčková, 188. so. Em. Jelínek, 189. so. J. Jelínek, 190. fino. Štěpánková, 191. so. Smeták, 192. so. Kňourek, 193. so. Štorch, 194. so. Pumr, 195. so. Sobischek, 196. sino. Bínová, 197. so. Mink, 198, sino. Jelínková — Hradec Králové, 199. so. Tutsch — Praha, 200. so. Achillini — Genova, 201. so. Wendler — Pastetten, 202. so. Penkov — Mlečevo, 203. so. Popiliev — Gumušnik, 204. so. Stojnov — Sevlievo, 205. so. Fitton — Sklepley, 206.—207. gesoj. Boubon, 208.—209. sino. kaj fino. Focké — Orléans, 210. fino. Lecointe — St. Jean le Blanc, 211.—212. gesoj. Pilault — Orleans, 213. so. Aalderink — Amersfort, 214.—215.—216. familio Kudela, 217.—218. so. kaj fino. Hoschek, 219. so. Beck, 220.—221. soj. Štancl, 222.—223. soj. Řebíček, 224. so. Wolf, 225.—226. gesoj. Eisler, 227. fino Neužilová, 228. so. Blažek, 229. so. Freund, 230. fino Malá, 231. fino. Límová, 232. fino Hanzlíková, Olomouc, 233. so. Tannenbaum — Wien, 234. so. Šimonek — Chicago, 235. so. Pech, 236. so. Pešek, 237. fino. Janovcová, 238. so. Šnajdr, 239. so. Hrabák, 240. kaj 241. gesoj. Kaisr, 242. sino. Trávníčková, 243. fino. Trávníčková — Plzeň, 244. so. Kraml — Letná, 245. so. Jíra, 246. fino Šteklová — Plzeň, 247. so. Jankovec — Chotiměř, 248. so. Přibáň — Plzeň, 249. so. Pothast — Hago, 250. so. Hes, 251. so. Lukeš, 252. so. F. Kovanda, 253. so. K. Kovanda — Doubravka, 254. so. Laquer Budapest, 255. so. Doerfler — Mühldorf, 256. so. Hoffmann — Danzig, 257. kaj 258. gesoj. Laurans, so. Fridrich — Brno, 263. sino. Johne — Potschappel, 264. so. Huenlich — Dresden, 265. so. Amort — Danzig, 266. so. Bernhard, 267. so. Nelz, 268. so. Donien 269. so. Schenkel — Friedrichsthal, 270. so. Řehák — Kopidlno, 271. fino. Čechova — Kerhartice, 272. fino. M. Vašíčková, 273. so. Vašíček — Ústí n. O., 274.—275. gesoj. Němec — Karlovy Vary, 276. so. Giesswein, 277.—278. gesoj Tolnai, 279. so. Pados, 280, so. Major, 281. So. Pászty, 282. so. Wiesinger, 283. Dro. Racz, 284. fino. Lederer, 285. kaj 286. gesoj Dro. Loránd — Budapest, 287. so. Socha — Zábřeh, 288. so. Kincl — Sušice, 289. fino Fridrichova — Košičky, 290. so. Verner — Praha, 291. so. Sobotka — Nová Ves, 292. so. Neubert — Kissingen, 293. kaj 294. gesoj Gottgetreu — Hannover, 295. so. Scholze — Reichenberg, 296. so. Mielert — Breslau, 297. so. Meagher — Dublin, 298. so. Liljemark — Gefle, 299. kaj 300. gesoj. Kubásek — Plzeň, 301. so. Roersch — Dresden, 302. so. Meijer — Heerewarden, 303. so. Novák, 304. so. Gross, 305. so. Starý, 306. so. Hahn, 307. so. Erhart, 308. so. Pavlík, 309. so. Kolář — Plzeň, 310.—311. gesoj. Šilha — Brno, 312. so. Haase — D. Růžodol, 313. so. Kučera — Kladruby, 314. so. Garcia Hernandes — Madrid, 315.—316. gesoj. Dro. Fousek — Přelouč, 317. fino. Morávková — Praha, 318. so. Blum — Krásné, 319. so. Krofta — Strašice, 320. fino. Janalíková, 321. fino. Minaříková, 322. fino. B. Chytilová, 323. fino. R. Chytilová, 324. so. Chvátík, 325. sino. Müllerová — Bystřice p. H., 326. fino. Dragounová — Olomouc, 327. fino Brablcova — Kroměříž, 328. fino Semeráková, 329. fino. Reichlová, 330. fino. J. Čížkovská, 331. fino. R. Čížkovská, 332. fino. E. Čížkovská — Praha, 333. so. Kappelmann, 334. so. Grützner — Dresden, 335. so. Larrea, 336. so. Elizondo — Bilbao, 337., 338. 339. kaj 340. familio Kavan — Plzeň, 341. so. Mikš — Nusle, 342—343. gesoj. Applebaum — Liverpool, 344. fino. Havránková — Prostějov, 345. so. Spurný — Kyjov, 346. Roskes — Hago, 347. so. Bárta — Proseč, 348. so Bartal — Ujhartyan, 349. so. Kopecký — Rosice u P., 350. so. Daniel, 351. so. Wagner, 352. sino. Kroutilová, 353. sino. Cvetlerová, 354. sino. Veverková, 355. sino. Petrová, 356. so. Bouček, 367. fino. Vondrova, 358. fino. Vamberová, 359. fino Kratochvílová, 360. fino Niesslová, 361. fino Antošová, 362. kaj 363. finoj M. kaj R. Vavřínová, 364. so. Meazzini — Badiola, 355. so. Řádek — Turnov, 366. fino. Gaisbauerová — Vizovice, 367. fino. Březíková, 368. fino. Kilarová, 369. fino. Grmelova, 370. fino. Holibkova, 371. fino. Mikšikova — Bystřice, 372. so. Jelínek — Ružomberk, 373. so. Murath, 374. so. Hrabak, 375. so. Kratochvíl, 376. so. Bloch, 377. so. Oberst — Brüx, 378. so. Kaupe — Hago. 379. so. Amon, 380. so. de Eiszaky — Cluj, 381. so. Sappl — Graz, 382. so. Ranft — Dresden, 383. so. Bouška, 384. fino. Květonova — Vršovice, 385. so. Kasal — Plzeň, 386. so. Spire — Užhorod, 387. fino. Dandova — Žižkov, 388. so. Kozák — Lobzy, 389. so. Svoboda — Praha, 390. so. Brich — Buběneč, 391., 392. kaj 393. familio Dro. Filippetti — Milano, 394. Markizo Montezomolo — Castiglioncello, 395.—397. familio Julia — Céret, 398. so. Arrieu — Jeysses, 399. so. Donés — Montréjean, 400. ĝis 404. familio Stejskal, 405. so. Netušil — Smíchov.

**Donacoj.** So. Tutsch 15 K, So. Fitton 20 ŝ., Esper. Grupo Olomouc 100 K, So. Tannenbaum 175 aŭstr. K, so. Gottgetreu 18 m., paroĥ. Kučera 100 K, lernantoj de inĝ. prof. Kroužil 1.000 Kronoj.

**Deponita mono:** So. Degenkamp 1250 Kĉ, so. Faulhaber 2.000 K, so. de Boer 2.000 K, so. v. Doorne 3.000 K, so. Laurans 4.500 K, fino. Boon

1.247.28 K, so. Tannenbaum 250 K, so. Thiebault 379.13 K, so. Jung 53.10 K, so. Molnár 100 K, so. Grenkamp 90 K.

**Garantia fundo:** 8. So. Vinzent 100 K, 9. so. Thiélbault 397.13 K, so. Alfonso Sanz 100 Kĉ, 11. Esper. Societo Olomouc 300 K, 12. so. Molnár, 13. so. de Wolf, 14. Esp. Klubo Plzeň, 15. so. Kavan, 16. so. Applebaum, 17. so. Grenkamp po 100 Kĉ.

**Prezoj de la biletoj por fervojlinioj.** Praha-Sob-Budapest: II. klaso 168 Kĉ.+106 Kh. III. kl. 84. Kĉ.+73 Kh. — Praha-Cmunt (Cmünd)-Wien-Graz: II. klaso 84, 80 Kĉ+183.60 K aŭstr., 248.40 K aŭ. III. klaso: 42.20 Kĉ+91.80 K aŭ. — Praha-Cheb (Eger)-Kufstein-Brenner-Trento: II. kl. 97.60 Kĉ+110 M+183.60 K aŭstr.+35.80 L. III. kl. 48.80 Kĉ+67 M+64.80 K aŭ.+18.90 L. — Praha-Spielfeld-Beograd: II. kl. 97.20 Kĉ+399.80 K aŭ.+226.50 D. III. kl. 48.80 Kĉ+199.80 K aŭ.+ 113.25 D. — Spielfeld-Longatico-Trieste: II. kl. 79.50 D.+ 26.45 L. III. kl. 39.75 D.+14.10 L. — Brenner-Roma:: II. kl. 137.60 L. III. kl. 71.30 L. — Brenner-Genova: II. kl. 106.25 L. III. kl. 55.20 Liroj. — Praha-Cheb-Appenweier-Bassel-Bern: II. kl. 179.28 M+11 Fr. sv. III. kl. 111.30 M+7.30 Fr. sv. — Praha-Strassburg-Lyon: II. kl. 77. Fr.+35.80 Fr. III. kl. 47 Fr.+22.75 Fr, — Praha-Paris: II. kl. 381.15 Fr. III. kl. 135 Fr. — Praha-Děčín (Tetschen)-Aachen-Brussel: II. kl. 68.80 Kĉ+211.20 M+17 Fr. III. kl. 34.40 Kĉ+126 M.+10 Fr. — Praha-Děčín-Salzbergen-Amsterdam: II. kl. 68.80 Kĉ.+172.60 M.+ 10.40 n. g. III. kl. 34.40 Kĉ.+102.40 M.+ 6.30 n. g. — Praha-Berlin-Hamburg: II. kl. 68.80 Kĉ.+145 M. III. kl. 34.40 Kĉ.+89 M. — Praha-Boxtel-London: II. kl. 68.80 Kĉ.+194.40 M.+37.50 n. g. III. kl. 34.40 Kĉ.+115.70 M.+33.20 n. g. — London-Calais-Strassburg-Cheb-Praha: Orient express: I. kl. 561 Fr. aŭ., 14.20 L. — Praha-Berlin-Rostock (Kopenhago): II. kl. 68.80 Kĉ.+77 M.+ 54 M. III. kl. 34.40 Kĉ.+45 M,+31.80 M. — Praha-Sassnitz-Warnemünde (Stockholm): II. kl. 68.80 Kĉ.+87.60 M.+85.20 M. III. kl. 34.40 Kĉ.+ 87.60 M.+85.20 M. — Praha-Leipzig-Frankfurt: II. kl. 68.80 Kĉ.+50.80 M.+93 M. III. kl. 34.40 Kĉ.+30.40 M.+55.80 M. — Praha-Strassburg-Paris-Narbonne-Perignan (Barcelona): II. kl. 77 Fr.+71 Fr.+139.20 Fr.+8.90 Fr. III. kl. 47 Fr.+45 Fr.+88.55 Fr.+5.65 Fr.

**Pasportoj:** Por la veturo al Praha kaj reveno estas necesa pasporto, pretigita de la policestrejo aŭ alia kompetenta ŝtata ofico, vizita de la ĉeĥoslovaka ambasadorejo aŭ konsulejo kaj de la konsuloj de ĉiuj traveturotaj ŝtatoj.

**Adreso** por aliĝoj kaj prikongresa korespondado: Aug. Pitlík, Praha III. Nerudova 40.

Por la Loka Kongresa Komitato:
Augustin Pitlík, ĝen. sekretario.

**Rimarko!!** Oni ne forgesu aldoni por respondo aŭ respondkuponon aŭ afrankon en neuzitaj naciaj poŝtmarkoj!

---

**Al la vizitontoj de la XIII.**

31. de Jul. — 6. de Aŭg. 1921a.

La esperantistaj asocioj en Aŭstrujo sentas la agrablan devon akceli la plenan sukceson de l' solena festo de la tutmonda samideanaro kiu en ĉi tiu jaro estas aranĝata en la ĉefurbo de la najbara Bohemujo.

Wien mem, urbo la plej granda en Mezeŭropo, aranĝos nek antaŭ nek postkongreson, por ke aliaj jam projektataj samspecaj aranĝoj per tio ne estu malhelpataj. Multaj esperantistoj certe jam nun decidis veturi al Budapest, Graz, Dresden aŭ aliloken. Sed estas sendube, ke multaj samideanoj, veturontaj el malproksimaj landoj al la kongreso en Praha, deziras tiuokaze viziti ankaŭ la vidindan kaj gestaman ĉefurbon de Aŭstrio, la historie faman kaj nun tiel ofte — bedaŭre kun kompato — nomatan Wien—Vieno. Multaj kongresanoj eĉ devige travojaĝos kaj nepre restados ĉi tie.

La esperantistaro en Wien—Vieno estas tute konscia pri la devo, kiu koncernas la prizorgon por la bonvenontaj gastoj. Ĝi preparos ĉion, por bone akcepti ilin kaj kiel eble plej agrablig i ilian restadon en la urbo »apud la blua Danubo«, kuŝanta en belega ĉirkaŭaĵo kaj posendanta tiom da antikvaj belaĵoj.

Precipe le tagoj antaŭ la Univedsala Kongreso, la 28. k. 29. de Julio, kaj la tagoj post ĝi, la 6.—10. de Aŭgusto, estos, la plej taŭgaj por tiaj vizitoj. La fremdlandaj samideanoj estas do korege invitataj aranĝi siajn antaŭ aŭ postkongresan vojaĝon tiamaniere, ke ili povu restadi dum tiuj tagoj en Wien.

Kiu volas viziti nian belan hejmlandon estas petata, anonci la tagon (ev. horon) de sia alveno kiel eble plej frue, por ke la akcepta komitato povu ĝustatempe zorgi pro enloĝigo. — La certeco, ke ĉiu samideano estos ankaŭ en Wien kore kaj kontentige akceptata, povus akceli la decidon viziti la Dektrian en Praha.

Estas ankaú projektata komuna veturado el Wien al Praha, eventuale ankaŭ el Praha al Wien.

Dum la tagoj de alveno de gastoj estos ankaŭ en ĉiuj Wien-aj stacidomoj akcepta komitato kaj en la centro de la urbo akceptejo kaj informejo.

Samideanoj, dezirantaj viziti Wien, bonvolu tuj sciigi pri tio la subskribitan estron de la komitato.

Ĉiuj sin anoncintoj poste ricevos apartan cirkuleron kun pluaj detalaj informoj.

Ĝis revido en Wien!

Marto 1921.

Por la akcepta komitato de la Esperanto-Delegitaro de Wien:
Hugo Steinhauer,
Wien II., Böcklinstr. 8.

---

**Samideanoj el malgrandaj nacioj!**

La malgrandaj nacioj estas la ĉefaj interesatoj en problemo de internacia lingvo, prave skribis sinjoro Privat. Sed kio okazas? Ni, filoj de malgrandaj nacioj seniniciate atendas, kiel decidos la Angloj, Francoj kaj Germanoj. Sed, ili ne bezonas internacian lingvon tiel urĝe kiel ni.

Samideanoj! Ofte mi aŭdis riproĉon, ke la grandaj nacioj, kiuj havas en siaj landoj la plej gravajn entreprenojn esperantistajn, ne sufiĉe propagandas esperanton. Sed, kiajn miraklojn vi ankoraŭ atendas de grandaj na-

.cioj? Konsideru pri la decidemo de la Pariza komerca ĉambro! Ne forgesu, ke la propagandisto de esperanto ĉe gvidantaj nacioj estas ofte nomata perfidulo de patrujo!

Ĉu ni volas ankaŭ iniciate agi en la demando de internacia lingvo? Aŭ ĉu nia gejunularo en lernejoj precipe komercaj kaj specialaj devas eterne stari embarasite antaŭ la multlingveco, tasko, kiu estas ekster la kapabloj de studentoj?

Samideanoj!

Dum la Praha kongreso oni intencas organizi kunvenon, de samideanoj el malgrandaj aŭ politike ne gvidantaj nacioj! Venu tien Vi Albanoj, Araboj, Armenoj, Bulgaroj, Ĉinoj, Danoj, Estonoj, Finnoj, Grekoj, Hindoj, Hungaroj, Kroatoj, Letonoj, Litovoj, Luĵicaj Serboj, Poloj, Portugaloj, Rumanoj, Serboj kaj Turkoj aŭ sendu al la subskribito ĝustatempe vian raporton kaj proponon!

Ni volas koni la staton de nia forto kaj labori.

Pripensu kaj sciigu min, kiamaniere Vi intencas igi Vian registaron aŭ delegiton en Ligo de nacioj, ke ili estu favoraj al esperanto.

Ĉu vi povas en Via nacio atendi helpon de sciencistoj, politikistoj, ĵurnalistoj, verkistoj? De kiuj? (Sciigu la adresojn.)

Sendu ilian opinion pri esperanto.

Kia estas ĉe Vi la situacio de modernaj vivantaj lingvoj? Kiu estas preferata lingvo? Kiaj estas ĝiaj sukcesoj en lernejoj?

Kion Vi opinias pri la artikolo de samideano J. Maĉernis en Esperanto, Novembro 1920 paĝo 204?

Ĉu Vi povas promesi, ke dum la estonta jaro almenaŭ unu sciencisto de Via nacio (kiu nomo?) skribos verkon en esperanto?

Sendu Vian proponon, raporton aŭ sciigon al mi. Represu ĉi tiun alvokon en nacioj gazetoj! Venu en Praha!

Rudolf Fridrich,
profesoro ĉe gimnazio, Brno, Královo Pole, Moravio, Ĉeĥoslovakio.

---

**Esperantista movado en Rusio.**

Ni hazarde ricevis en la manojn kelke da esperantaj presaĵoj el konsilantara (sovjeta) Rusio kaj ni devas admiri la rusajn samideanojn legante, kun kia entuziasmo ili malgraŭ lo malfacilegaj vivkondiĉoj en ilia lando laboras. Sen interrilato kun eksterlando ili ne laciĝis en ilia fervoro, dum nepriskribeblaj cirkonstancoj ili organizas paroladojn, instruas nian lingvon kaj spite de ĉiuj mankoj ili eldonas esperantajn lernolibrojn kaj vortarojn.

Ĉiu linio de la presaĵoj estas por ni interesaj. En la »Esperantista Movado«, monata organo de la kronŝtadta e-ista societo (16 pĝ, prezo 100 rublojn) ni legas interalie, ke la ĉefaj kaŭzoj, kial ĉesis ekzisti la granda Domo de Esperanto en Moskvo estis malsato kaj malvarmo. Ne estis eble restadi en la nehejtigitaj ĉambroj kaj la registaro trovis necesa forpreni la malplenigitan domon. Ĉi-tiu kontraŭvola mallaboremo estis parte kulpa pri la ne tuja sukceso de nia afero ĉe la registaro. La Komisarejo de nacia klerigado konstatis post detala trastudo, ke la grava problemo de la lingvo internacia estis sole kaj plene solvita per Esperanto. Gorkij varme rekomendis al la registaro alprenon de E-o kaj la tasko de moskvaj e-istaj institucioj estis daŭrigi la laboron en ĉi-tiu direkto kaj helpi al la efektivigo de la intencita ĝenerala enkonduko de E-o kiel deviga objekto en la lernejojn. La jam menciitaj malfacilaĵoj malebligis bedaŭrinde eluzi plene nian venkon.

Nia lingvo estas nun instruata en multegaj urbaj kaj eĉ vilaĝaj lernejoj; ni sciiĝas pri kelkaj distriktoj, kie la lernado estas deviga.

Pri la disvastiĝo de E-o en Rusio ni legas nur ĝojigajn faktojn. Oni raportas pri laboro de e-istaj kluboj en preskaŭ ĉiuj pli gravaj urboj de la lando. La societoj estas ofte subtenataj de la registaro, en Ĥerson donis la Loka fako de la Komisarejo de nacia klerigado 200.000 rublojn al la societo por ebligi kursojn por instruistoj, la samon ni aŭdas pri Ĉerepovec kaj Serpuĥov. En kelkaj lokoj eldonis la Fakoj de la komisarejo lernolibrojn kaj vortarojn e-ajn.

La Esperanto-muzeo kaj biblioteko en Saratov havas nelimigitajn sumojn je sia dispono. La lasta Tutruslanda kongreso de arto akceptis unuvoĉe E-on por siaj interrilatoj. La registaro de la Kirgiza federativa respubliko en Orenburg subtenas ĉiuflanke nian movadon. En Kaŭkazo oni vigle laboras. Dum la pasinta duonjaro estis ekzamenitaj ĉe la Centra Kaŭkaza E-ista Komitato preskaŭ 800 da personoj. Organizaĵoj e-istaj ekzistas en jenaj kaŭkazaj lokoj: Anap, Armavir, Baku, Groznoe, Gelendĵik, Jejsk, Jekaterinodar, Jelizavetpole, Kislovodsk, Majkop, Nalĉik, Novorosijsk, Soĉ, Tiflis, Tuapse kaj Vladikavkaz.

Ni legas pri multnombre vizitataj e-aj kursoj por ruĝarmeanoj en Moskvo, Petrograd, Kronŝtadt, Saratov, Ĉerepovec, Jekaterinodar, Odesa, Perm, Barnaul, Omsk, por poŝtistoj en Ĥerson, Vitebsk, Tambov, Omsk, por fervojistoj en Jekaterinodar kaj pri aviadistoj en Kazanj lernataj nian lingvon. Ni ekcias pri la Konferenco de rusaj e-istoj okazinta de la 2 ĝis 5. de oktobro 1920 en Nijnij Novgorod. Ĝi decidis prepari la IIan Tutruslanden kongreson de e-istoj, kunvokotan ĝis la 31. de majo 1921 en Moskvon. En Vitebsk ekzistas »Strato de Zamenhof« kaj »Strato E-o«.

Numero de la petrograda »Espero« kaj kronŝtadta »Movado E-ista« mencias pri eldonado de jenaj pluaj gazetoj. En Vjatka aperas »Bulteno«, en Homel »Homela E-isto«, »Malgrandeta Bulteno« en Bolĥov, hektografiita »Aranĝaĵo« en Makvejevka. Interesa estas la sciigo pri la socialista gazeto e-ista »Evolucio« aperanta en Ĥinio. La redakcio estis de la ĥina registaro fermita kaj la redaktoro Pekon arestita, sed la ĥinaj socialistoj daŭrigas malgraŭ la malpermeso la eldonadon de ĉi-tiu gazeto.

Kortuŝitaj ni tralegas ĉi-tiujn gazetojn. Ni vidas, ke ni povas nur ĝoji je tiu momento, kiam ekkomencos denove regulaj poŝtaj rilatoj kun ĉi-tiu tiel longe por ni fermita lando. Ni reakiros tiam fortan batalanton por nia komuna afero.

oooo

# DIVERSAĴOJ

**La daŭrigon** de la felietono, finon de la artikolo »Zorgu pri la belsoneco« kaj »Bibliografion« en tiu ĉi numero ni devis ellasi pro troa abundeco de nia presmaterialo.

**Esperanto en Ŝtata Budĝeto.** La Finnlanda parlamento pritraktis komence de marto la ŝtatan budĝeton kaj ĉe tiu okazo ĝi decidis subvencii la Esperanto-Asocion de Finnlando per 25.000 F. M. Laŭ sciigo de »Esperanto Finnlando« tiun ĉi dedicon antaŭiris tre vigla diskuto de la deputitoj. Ĝi estas la unua ŝtata subvencio al esp. institucio, pritraktita en parlamento kaj tial ni ĝin notas kun speciala ĝojo.

**La Pariza Komerca ĉambro** akceptis rezolucion, per kiu ĝi decidis enkonduki instruadon de Esperanto en la komercajn lernejojn de sia distrikto kaj esprimis la deziron, ke tiu instruado ĝeneraliĝu en la komercaj lernejoj en la tuta Francio eĉ en eksterlando per helpo de la komercaj ĉambroj. Tiu ĉi decido estas speciale rimarkinda, ĉar ĝi okazis post esploro de speciala komisiono por komerca instruado.

**Esperanto kaj Komercaj ĉambroj.** Niajn legantojn sendube interesos la fakto, ke 24 Komercaj ĉambroj korespondas per Esperanto. Ili estas: en London, Paris, New-York, San Francisco, Buenos Aires, Barcelona, Sabadel, Lisboa, Arras, Abbeville, La Rochelle, Laval, Rennes, Puy, Krakow, Kassel, Bromberg Karlsruhe, Leipzig, Dresden, Plauen, Schweidnitz, Liegnitz kaj Reichenberg (Liberec).

**Komercista kunveno en Praha.** Dum la XIII. kongreso en Praha okazos ankaŭ la kunveno de esp. komercistoj, kiun aranĝos la »Internacia Komerca Revuo«. Ĉiu interesulo sciigu siajn eventualajn dezirojn aŭ proponojn al so. red. Hj. Unger, en Zurich, Postfach 6104.

**Esperantista kurso en arbaro** estas aranĝata de so. V. Jareš en Místek.

**Esperanto en lernejoj.** La kantona registaro en Ĝenevo (Genéve) decidis enkonduki devigan instruadon de Esperanto en ĉiujn elementajn lernejojn de sia kantono depost septembro t. j. Tiel aperos Esp. en lernejo la unuan fojon diel »deviga«.

**Per biciklo al la XIII.** Soj. G. Seubring kaj R. Stoeltje el Haarlem (Leidschestraat 113), Holando, sciigis nin, ke ili alveturos per biciklo al la XIII. Ili forveturos komence de junio kaj estas pretaj paroladi pri siaj travivaĵoj en la esp. societoj de la urboj, kiujn ili trapasos.

**Idista laboro.** En kafejo »Union« de Praha iu noblanima idisto ŝtelis el kovriloj la esp. gazetojn kaj anstataŭis ilin per presaĵoj idistaj. El la leterkesto de la Esp. klubo troviĝanta en la sama kafejo iu ŝtelas la korespondaĵojn En poŝtoficejo de Brno iu idisto anstataŭis la gazeto »Esper. zpravodaj« de Fino. Šupichová per idistaj flugfolioj, enŝovinte ilin en la originalan kovrilon de »Zpravodaj«. — Admirinda propagando, ĉu ne?

**Komerca ĉambro de Olomouc (Ĉeĥoslovakio) por Esperanto.**

Informita pri la decido de la Komerca Ĉambro de Paris la Komerca Ĉambro de Olomouc respondis al informinta samideano jene:

Komerca kaj Metia Ĉambro en Olomouc.

Nro.4432. Olomouc, la 2.-4. 1921.

Al Sro. A. Kudela en Olomouc!

Je Via letero de la 26.-3. rilate la enkondukon de Esperanto, kiel objekto de instruado en la komercaj lernejoj, la subskribita K. kaj M. Ĉ. informas, ke ĝi plej multe helpos viajn klopodojn kaj subtenos en la sfero de sia agado la instruadon de E., tiom pli volonte, ke la malfacila komerca situacio kaj la batalo pri la monda merkato nepre postulas rimedon por interkompreno de la popoloj kaj laŭ la atesto de la personoj konantaj la aferon, la lingvo Esperanto estas en la plej granda mezuro kapabla esti tia lingvo de interkompreno.

Komerca kaj Metia Ĉambro de Olomouc.

V. Prez. de la Administra Komisiono: Pícha, pm. Sekretario: Dro. Svěrák, pm.

**La tutmonda Konferenco de la Ruĝa Kruco** en Geneve decidis (7 aprilo 1921) instigi ĉiujn R. K. societojn, ke ili disvastigu la lernadon de Esperanto. Ni raportos pli detale en nia venonta numero.

**Kongreso por la organizo de la intelekta laboro.** Laŭ iniciato de la Unuiĝo de l'Internaciaj Asocioj akazos nunjare »Tutmonda Kongreso por la organizo de la intelekta laboro«. Ĝi okazos la 20an, 21an kaj 22an de augusto proksima kaj ĝin ĉefe okupos la etudo pri la nunaj vivkondiĉoj de intelekteco kaj de la intelektuloj. Samtempe komenciĝos la dua kŭnsidaro de la Internacia Universitato, kiu dŭros ĝis la dekkvina de septembro. Aliaj kongresoj estos organizataj dum tiu sama periodo. Ĉiuj tiuj kunvenoj kaj kongresoj trovos lokon en Bruselo en la »Monda Palaco«, kiun la belga registaro afable metas je la dispono de la Unuiĝo de l'Internaciaj Asocioj.

**Al esp. socialaj laborantinoj:** Por revivigi la »Universalan Virinan Asocion« mi petas, ke ĉiuj esp-inoj precipe la iamaj laborantinoj sendu afable siajn proponojn kaj dezirojn (ne forgesu aldoni respondkuponon aŭ neuzitajn poŝtmarkojn) al F. Nesměráková (instruistino) aranĝantino de faka virina kuvenno ĉe la XIIIa U. K. E., Praha, Vršovice, Barákova 174, Ĉeĥoslovakio.

**Peto.** Kiu el samideanoj prizorgus somerloĝejon (simplan) por mi kaj por 3 knaboj? — So Koutek, revidento en Praha 1066-I., Rybná ul. 11-B.

**Holanda esperantisto,** vizitonta la XIII. kongreson serĉas unusemajnan pensionon en esperantista familio en Praha. — Leterojn kun kondiĉoj oni adresu al: So F. Faulhaber, Borgerstraat 103 I., Amsterdam, Nederlando.

**Darujte české knihy! Pomozte!** Čes. střední škola ve Vídni, jejíž potřeba a schopnost života je zjevná (v 2. roce 7 tříd se 230 žáky), trpí mimo jiné velikým nedostatkem knih v knihovně žákovské i učitelské. Mnozí žáci odcházeli smutně na vánoční prázdniny bez české knihy, neboť se na ně nedostalo. Členové sboru nemají příruček k osvětové a jiné činnosti. Pomozte knižním darem důležité menšině a pošlete laskavě buď přímo (III. Schützeng. 31), nebo prostřednictvím »Komenského« Praze II., Štěpánská 9 a redakci našeho listu, která další předání obstará.

**Fumantoj!** Ni rekomendas al Vi la bonegajn fabrikoĵojn »Trianon« de la fo. Horowitz en Liberec, kiujn ni mem trovis tre bonaj. Vidu la anoncon!

## KRONIKO

**II. ĝenerala kunveno de Ĉ. Asocio E.**

Ĝi okazis dimanĉe la 27/2 1921 en la rest. Šramota en Praha-II., Václavské nám. 64. Partoprenis en ĝi 50 personoj, kiuj reprezentis 237 voĉojn kaj jenajn lokojn Bratislava 1, Bystřice p. Host. České Budějovice 1, Červený Kostelec 2, Hradec Král. 2, Plzeň Esp. Kl. 1, Plzeň Lab. Kl. 3, Pardubice 1, Kladno 1, Praha Rondeto 9, Praha Klubo 29. Prez. so Eiselt malfermas la kunvenon je 1/2 11. So. Waldstein tralegas la protokolon de la fonda kunveno, en kiu malgrandan ŝanĝon postulas so. Bouška. Sekvas raporto de sekr. R. Hromada, kiun la kluboj ricevos detale kaj el kiu ni citas: La pasinta jaro estis jaro de konstruado de la organizo. La rezultato atingita estis la 31/12 1920 jena: Asocio havis 416 membrojn, el ili 23 izoluloj (11 Bohemio, 6 Moravio, po 3 el Silezio kaj Slovakio). La cetero estis organizita en lokaj grupoj (9): Praha Klubo 108, Hradec Král. 57, Plzeň Klubo 42, Plzeň Laboristoj 40, Budějovice 36, Praha Rondeto 32, Červ. Kostelec 28, Pardubice 27, Bystřice p. Hostýnem 23. Kalkulataj estas sole kluboj efektive pagintaj. Tial mankas Zlín 49, kaj Brno 47. Krom tio ne kalkulataj estas Prostějov kaj Olomouc, el kiuj aliĝis ĝis fino 1920 sole 3 membroj, kiuj estas kalkulataj kiel izoluloj.

La nombro de la membroj ne respondas al la nombro de ĉeĥaj esp-istoj. Pruvo, ke la ceteraj aŭ nelegas Progreson kaj Zpravodaj aŭ singarde atendas ĝis la Asocio potenciĝos.

En la fino de 1920 speciala varbilo estis sendita laŭ ĉiuj akireblaj adresoj kun sufiĉe bona rezultato: En la lastaj 8 semajnoj aliĝis 40 izoluloj, sekve la tuta nombro fine de februaro estis 515 membroj.

Asocio reprezentas ĝis 28/2 esperantistojn el 41 lokoj de Bohemio, 18 de Moravio, 3 de Silezio, 6 de Slovakio entute do el 68 lokoj de la tuta respubliko.

Asocio sendante al ĉiu membro »aliĝilon« enhavantan datojn speciale interesajn laŭ esp-ista vidpunkto, starigas per tio fidindan statistikon pri la stato de la movado.

Sekretario raportas pri siaj klopodoj, printempe 1920, havigi al la Asocio Progreson kiel presorganon. —

Koncerne la propagandon: Krom so. red. Tittl, la prez. so. Eiselt, dufoje intervenis ĉe la ministro Habrman en 1920, kaj en januaro 1921 samtempe kun la delegitoj de la Germana Ligo, ĉe la ministro Dro Šusta.

En la j. 1919—20 nedeviga instruado de E. estis permesita en kelkaj elementaj lernejoj, ofte la insruistoj estis por la instruado de E. pagitaj. Nur de septembro 1920 la pagado estis rifuzita. La ministro de instruado promesis sin informi...

Al Pedagogia instituto de Komenský estis sendita detala raporto — laŭ gia deziro — pri instruado de E. en eksterlandaj lernejoj kiun verkis so. Bouška. Dro. Kamaryt sendis al la ministerio — ĉe la okazo de la enketo pri reformo de la mezaj lernejoj — proponon, ke la estonta lernejo instruu esperanton oficiale: en la 4klaso 3 horojn semajne, kaj en la 5 kaj 6 kl. po 1 horo.

Pri nomigo de oficialaj ekzamenantoj de E. legu en la pasintaj n-roj de Progreso. Same pri la propagando en mezaj lernejoj de Praha, laŭ gvidado de so. prez. Eiselt, pri samtaga kaj samfaka propagando laŭ propono de fino. Vamberová el Pardubice, rezultatoj de ekzamenaj komisionoj.

Fine la sekretario akcentas ke la korespondaĵoj kaj alia laboro por Asocio tiel pligrandiĝis, ke ne estas plu eble ke li mem ĝin prizorgu, precipe por li, kiu estas ankoraŭ alie okupita por Esperanto. Li rekomendas ke unua sekretario estu ankaŭ Prahano.

So. red. Tittl akcentas la plendon de la sekretario, ke ankoraŭ multaj sam-oj restas neorganizitaj. Plue li klarigas la miskomprenon en Plzeň koncerne la Progreson, kies kaŭzoj ne estis personaj kaj estis baldaŭ forigitaj. La ministro Habrman estis favora al E. kaj volis ĝin mem lerni jam antaŭ la milito, sed lia politika agado malhelpis tion. La nuna ministro Dro Šusta ne estas amiko de artefarita lingvo internacia. La starigo de la ekzamenantoj estis preparita ankoraŭ dum Habrman.

Detalan raporton pri la agado de Laborista Asocio en Plzeň donas ĝia sekr. so. Hrabák. Li akcentas la senlacan propagandon, kiun faras inter la laboristaro de la okcidenta Bohemio so. Pech. La laborista Klubo aranĝis en 1920 entute 9 kursojn: 4 en Plzeň, po 1 en Chrást, Krašovice, Škvrňany, Doubravka kaj Zbirov, kiun partoprenis 380 p. Nun komencas kursoj en Staňkov, Domažlice, Lužany kaj Nepomuk. La raportojn de tiu klubo publikigas »Nová Doba« kaj »Omladina«. En 1920 la Klubo aranĝis ekspozicion, kiun vizitis 10.000 p.

La prezidanto so. Eiselt esprimas dankon al so. Pech pro lia laboro, akompanatan per ĝenerala aplaŭdo.

So. Sklenĉka el Hradec Králové rakontas pri la organizo de la laboro en orienta Bohemio. Li akcentas, ke estas necese dividi laboron. La grupoj ne faru dise la laboro kiu apartenas al centro kaj kontraŭe oni ne postulu de la Asocio laboron kiun povas kaj devas plenumi lokaj grupoj. Liajn vortojn sekvis aplaŭdo de ĉiuj partoprenantoj.

Post konfirmo de tiuj ĉi raportoj kasisto so. Novák legas sian raporton, laŭ kiu enspezoj de Asocio en 1920 konsistis el kotizaĵoj: por 1920 Kĉ 1133.— por 1921 Kĉ 46.—, elspezoj 426.22 havaĵo de Asocio je la 31/12 1920 Kĉ 752.78. La kasisto akcentas ke la unua jaro estis jaro de konstruado, kiu montros rezultatojn nur en jaroj venontaj. La enspezoj dum la unuaj du monatoj de 1921 estas jam preskaŭ tiel grandaj kiel dum la tuta pasinta jaro.

Post la raporto de so. Kraus revidinta la kontojn kaj trovinta ilin en bona ordo, la kunveno aprobas la raporton de la kasisto.

Baloto de novaj komitatanoj: So. Sklenĉka (Hradec Král.) prononas ke ĉiuj komitatanoj estu nur Prahanoj, por ke ili pli bone povu interkompreniĝadi kaj gvidi la aferojn. Pro tio li rifuzas akcepti funkcion proponitan de so. Hromada. — Kontraŭ lia propono parolas Prahanoj: Hromada, Kraus, Pitlík kaj so. Plánský el Budějovice.

Poste la tuta komitato kun anstataŭantoj estis reelektita kun tiu ŝanĝo, ke anstataŭ so. Tadlánek — eksiĝinta — estis elektita kiel unua sekretario fino. Božena Vlčková el Praha-Vinohrady, Pštroska 16. Ankaŭ la kontrola komisiono kaj anstataŭantoj estis reelektitaj kun la ŝanĝo ke anstataŭ so. Spriska estis elektita s-ino Berta Keyzlarová el Červ. Kostelec.

Liberaj proponoj. Oni decidis laŭ propono de so. Medek el Brno, subtenita de so. Dro. Kamaryt kaj laŭ deziro esprimita de multaj studentoj fondi Sekcion de studentoj kaj junuloj pri kiu ni skribis sur alia loko. Ceteraj proponoj estis transdonitaj al la komitato kiu ilin priparolos en sia kunveno komence de aprilo.

Je la unua horo posttagmeze estis finita tiu ĉi kunveno, dum kiu multaj samideanoj ne konintaj sin amikiĝis kaj komunikinte al si siajn spertojn la partoprenintoj disiris por plua laboro, tiel grava precipe en la nuna jaro de la XIII. universala kongreso en nia lando. Posttagmeze estis promenado tra la urbo kaj amika kunveneto en kafejo Opera.

Hmd.

**Komitata kunveno de asocio** okazis la 14. IV. en kafejo Union. Ĉeestis: S-oj. Pech el Plzeň, Eiselt, Hromada, Novák, Pitlík, F-inoj. Vlčková kaj parte Šupichová. Raporto de la sekr.: Dum Foiro estis disdonataj al ekspozantaj komercistoj flugsfolioj pri E. kaj komerco. — Plue estis eldoni la plugfolio: Poselství z Francie: Učte se Esperantu, enhavanta raporton pri la decidon de Komerca ĉambro de Paris. — Vizito ĉe la direktoro de la Komerca Akademio en Praha. — Traktado kun la Societo de absolvintoj de tiu ĉi lernejo (S-ro. Mikš) pri kursoj. — Internacia studenta kongreso en Praha ne pritraktis la demandon pri E. pro manko de tempo. La gesoj. elektitaj de la ĝenerala kunveno akceptis la funkciojn escepte S-roj. Borovský, kaj inĝ. Novák. — Aliĝoj al la Sekcio de studentoj kaj junuloj multiĝas. Estos ellaborita regularo de la Sekcio. Proponoj de studentoj estas akceptataj. — S-ro. Kudela sendas kopion de la letero, per kiu la Komerca ĉambro de Olomouc tre favore sin esprimas por E. — S-ro. Inĝ. Kroužil informas pri simila letero de la komerca ĉambro en Brno. Novaj kluboj aliĝas: Karlovy Vary (Karlsbad) kaj Zlín. Estis fondita nova Klubo en Slezská Ostrava. — Preparata estas fondo de novaj Grupoj en Nový Bydžov kaj Kralupy nad Vlt. — Neoficialaj rondetoj ekzistas en multaj lokoj. — Laŭ la raporto de la kasisto la Asocio enspezis en 1921 Kč 2000.—. Danke oni notis, ke S-ro. Friedrich el Košice dointer Ĉeĥoslovakio kaj Germanio. Kion li skripriparolis kelke da aferoj, pri kiuj oni en ilia prepara stadio ne povas ankoraŭ raporti.

**Komercaj ĉambroj kaj Esperanto.** Informitaj pri la decido de la K. Ĉ. en Paris, tre favore sin esprimis por E. la komercaj kaj metiaj ĉambroj en Brno, Olomouc kaj Liberec (Reichenberg).

**Oficiala instruado de Esperanto.** En la III. (lasta) klaso de la knabina, burĝa lernejo (inf. 13 jaraj) instruas E. kun permeso de la lernejaj oficoj F-ino Anna Holancová.

**Praha.** En la E. Klubo S-ro. kom. Pitlík parolis dum 4 vesperoj pri la maniero, kiel gvidi la fremdulojn tra la urbo, preparante tiel la klubanojn por la kongresaj tagoj. S-ro. Hromada komencis la trian paron da kursoj en tiu ĉi sezono: elementan 72 p., konversacian 30 p. La Klubo aranĝis la 3.-4. ekskurson al Hanspaulka en Dejvice, la fame konata privata muzeo arkeologia. Klarigis la posedanto S-ro. Jíra. Gvidis sekr. de Klubo S-ro. Ginz. La 10.-4. ekskurso al Hvězda.

**Rakovník.** Publike pri Esp. parolis S-ro. kom. Pitlík el Praha.

**Brno.** En la societo de instruistoj pri E. parolis S-ro. lernejestro Krumpholc.

**Vyškov.** Kurson superan finis kaj elementan komencis F-ino. A. Holancová.

**Slezská Ostrava.** Esp. Rondeto fondiĝis. Prez. S-ro. Al. Kubala, mineja oficisto.

---

## DEZIRAS KORESPONDI.

**Rochlice** 234 u Liberce (Ĉeĥoslovakio). So. Kamil Ron, dez. koresp.

**Slavoňov** u Nov. Města n. Met. (Ĉeĥosl.). Fino. Manjo Marelová, instruistino, koresp. per p. k. kaj let. Ĉim resp.

**Ústí nad Orlicí 279** (Ĉeĥosl.). So. F. Prokopec, oficisto, interŝ. p. k. kaj p. m. kun ĉiuj landoj. Ne sendas unue, ĉiam respondas.

**Liberec** (Ĉeĥosl.), Souken. nám. So. B. Novotný dez. koresp. per p. k., p. k. ili. (markoj bildfl.), interŝ. esp. gazetojn kaj p. m. kun tuta mondo (escepte Ĉs. R.) Ĉiam resp.

**Husovice** (Moravio, Ĉeĥosl.), Soběšická 7. So. Enriko Stehlík dez. koresp. kun eksterlandanoj.

**Pardubice** (Ĉeĥosl.), »u Haldy« 87. So. A. Jandík, studento, dez. koresp. per il, k. Resp. ĉiam.

**Nové Město nad Metují** (Ĉeĥosl.). Fino. Vlasta Dvořáková, stu. interŝ. il. p. k., let. kaj florojn kun studentoj kj skoltoj fremdlandaj.

**Lobzy-Letná u Plzně** (Ĉeĥosl.). So. Burda dez. koresp. kun ĉiulandaj kamaradoj pri laborista movado per let. kaj p. k. Resp. ĉiam kaj tuj.

**Doubravka u Plzně** (Ĉeĥosl.), Podlesí 281. So. Frant. Keil dez. koresp. kun esper. en ĉiuj landoj. Sur il. p. k. metu la markon bildfl. Respond. ĉiam kaj tuj.

**Wien X.** (Aŭstrio), Arthaberpl. 3. So. Jos. Kocourek, gravuristo kaj eldonanto de esp. sigelmarkoj kaj insignoj invitas la konatajn samideanoj al interrilatiĝo. Postulu specimenaron de esper. propagandiloj kontraŭ respondkupono.

**Bailleul Nord.** (Francio), Route d'Ipres, Asile des Aliénées. Fino. L. Lebleu interŝ. p. m. sendas p. m. el Francio, Belgio kaj Francaj kolonioj. Resp. certa.

**Tokio** (Japan.) Jui-gakke, Shibuya. So. Dr. Saburo Ito dez. koresp. ĉeĥe kaj esperante.

**Tallin** (Estonio) Ruutli Tánv 11. So. Leop. Ehrenpreis dez. koresp. per il. p. k., markojn bildfl.

**Tallin** (Estonio) Ruutli Tánav 6. Esp. Un. »Espero«. Fino Naimá Vogt dez. koresp. per il. p. k., markojn bildfl.

**Přerov** (Moravio, Ĉeĥosl.), Str. de Kramář 31. So. Adolf Malík, dez. koresp. per p. k. kaj let., interŝ. p. m. kaj ludi koresponde ŝakon kun fremdlandanoj.

**Tokio** (Japan). No. 8, Takagicho, Aoyama, Akasaka. S-ro. Taro Iwasaki dez. koresp. kun ĉeĥaj esp.

---

### Al la Esperantistaro!

Estante tre okupata per la administrado de »La Progreso« kaj perado de U. E. A. mi ne havas tempon por fari polemikojn kun so. Ellersiek, Berlin, kiu sin ĉefe okupas per tiu senutila fako. Sed tamen mi bone observas ĉion, kio okazas en nia Esperantujo, kaj nun — ĉar mi estis provokita per »Leteroj de malnova Esperantano« en la no. 4. de la »Esperanto-Praktiko« — mi estas devigata respondi al la noblaj esprimoj, per kiuj la »polemiko« de so. Ellersiek estas saturita. Mi respondas jene: So. Ellersiek, eltiris nun la frazon »Ni liberiĝis de la germana despotismo, ni volas seniĝi eĉ de la germana kulturo...«, kiu estis publikita en »La Progreso«, maja no. 1919, sekve en la tempo, kiam daŭris la milita stato. inter Ĉeĥoslovakio kaj Germanio. Kion li skribis pri la ententaj ŝtatoj dum la militdaŭro, tion li jam forgesis.

Aŭdu! Dum preskaŭ du jaroj li kviete toleris tiun »ŝovinismon«, kvankam ĉiu deca ĵurnalisto tuj refutas la deklarojn, kiuj ofendas lin aŭ la ideojn kies partiano li estas. Sed so. Ellersiek nun, post du jaroj, bone ekkomprenis, ke venis taŭga tempo por refuti la frazojn pri nia nacia liberiĝo... La afero estas tute klara: estas antaŭ la XIII. Esp. kongreso, kaj al li ŝajnas, ke tia polemiko povas malutili la sukceson de la kongreso. Ĉar la XIII. kongreso estas la komuna afero de ĉiuj esperantistoj, ne nur de la bohemaj, mi prezentas la agadon de so. Ellersiek al la tutmonda esperantistaro, ke ĝi prijuĝu la ĝentilecon kaj utilecon de tiaspeca agado. Frant. Kavan.

## Esperantista Laboristo

estas la oficiala organo de

**„Liberiga Stelo“,**

Sennacieca Asocio Tutmonda kies unua kongreso okazos en Praha, dum Aŭgusto, sub la honora prezido de Henri Barbusse.

Ĉiu verdruĝulo devas nepre aboni tiun interesplenan gazeton se li konscias pri sia klasa bono.

Provnumero estas ricevebla interŝanĝe de respondkupono, aŭ io samvalora, sendota al la Administracio: 177, rue de Bagnolet, Paris (XXe).

Noto.— Oni povas aboni ĉe la redakcio de »La Progreso«, Plzeň, Radyňská 10. — Jare: 20 Kč.

## Anoj de malgrandaj nacioj

precipe orienteŭropaj kaj aziaj sciigu vian partoprenon kaj proponon por faka kunveno de la XIIIa al prof. Rud. Fridrich, Brno, Královo Pole.

## Ĉu Vi konas Viajn kapablecojn

k. Viajn ecojn danriĝerigajn? Kaj se Vi amas iun homon: ĉu Vi povas juĝi ĝian karakteron tia, kia ĝi efektive estas?? Evitu malagrablajn spertojn! Jam al multaj homoj mi helpis formi vivon feliĉigan. Ankaŭ al Vi mi povas utili, tial skribu tuj por interesa klarigo senkosta al Grafologa Konsitanto Kurt Kauffmann, Heidelberg (Germanio).


**ESPERANTISTOJ!!**

Postulu en ĉiuj tabakvendejoj nur

**»Verda Stelo«**

la plej delikatajn, plej belajn kaj plej malmultekostajn

**CIGARED-TUBETOJN**

kun higiena vato!

Fabrikaĵo de Iramon entrepreno

**HOROWITZ A SPOL.**

Liberec, Bohemujo, pošt. schránka 130.

Uzante la „Verda Stelo“ vi helpas propagandi por mia afero.

**Via horloĝo funkcios precize** se vi ĝin donos por rebonigi al

**FR. NOVÁK,**

horloĝisto **en Praha I. Malé nám. 10.**



**Horloĝoj. - Juveloj.- Esp. insignoj** de esp. klubo en Praha. - **Esp. glumarkoj,** kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4·-, afrankite Kč 5·-, 1000 pec. Kč 35·-, afrankite Kč 37·50.


Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Respondа redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.